XXXII ORDINARA TEMPO – 7an de novembro 2010-a

DIO NE ESTAS DE MORTINTOJ, SED DE LA VIVANTOJ - Komento al Evangelio de p. AlbertoMaggi OSM

Lk 20,27-38

En tiu tempo alproksimiĝis al Jesuo kelkaj sadukeoj, kiuj ne kredas je la reviviĝo; kaj demandis Lin: «Majstro, Moseo lasis al ni ĉi tiun skribitan ordonon: Se iu mortas, kaj lasas edzinon sen infanoj, lia frato edziĝu al la vidvino, kaj tiel li havu de ŝi filojn anstataŭ la mortinta frato. Estis do iam sep fratoj. La unua edziĝis kaj mortis sen infanoj. Tiam edziĝis je la vidvino la dua kaj poste la tria, ne lasante infanojn; kaj same ĉiuj sep: ĉiuj mortis sen filoj. Laste mortis ankaŭ la virino. Kies edzino estos tiu virino post la reviviĝo? Ĉar ĉiuj sep fratoj havis ŝin kiel edzinon.“

Jesuo respondis al ili: “Nur en ĉi tiu vivo homoj edziĝas kaj edziniĝas. Sed tiuj, kiuj reviviĝos el la mortintoj kaj estos juĝataj indaj je la estonta vivo kaj je la reviviĝo el la mortintoj, nek edziĝos, nek edziniĝos; ili ne plu povas morti, ĉar ili estas egalaj al la anĝeloj, kaj estas filoj de Dio, ĉar ili reviviĝis. Certe estas, ke la mortintoj reviviĝas: tion asertis ankaŭ la leĝo de Moseo, kiam ĝi parolas pri la arbetaĵo brulanta. Tie Moseo deklaras, ke la Sinjoro estas la Dio de Abraham, la Dio de Isaak kaj la Dio de Jakob. Pro tio Li estas Dio de vivantoj, ne de mortintoj, ĉar ĉiuj ricevas vivon de Li”.

Kontraŭ Jesuo furioziĝas la fina ofensivo. Laŭ sinsekvaj ondoj Jesuo eltenis la atakojn kaj ilin silentigis, de la ĉefpastroj, de la skribistoj, la maljunuloj kaj la fariseoj, kiuj estis mirigitaj por lia respondo kaj silentis. Nun estas la vico de la Sadukeoj. Ili apartenas al la pastra, ekonomia aristokrataro de la lando. Skribas Luko, en la ĉapitro 20, versiklo 27, *“alproksimiĝis al Jesuo kelkaj sadukeoj*”, la nomo devenas de Saduk, pastro je la tempo de Reĝo Davido.

En la epoko de Jesuo ili tenis la ekonomian povon, estis la pastra nobela aristokrataro de Izraelo. *“Kiuj ne kredas je la releviĝo”*. La vorto ‘releviĝo’ aperas la unuan fojon en la Libro de Danielo, sed la Sadukeoj, estreme konservativaj, rekonas kiel inspiritan, tio estas kiel Dian vorton, nur la librojn de la Leĝo, la Toraon. Do ili rekonas nek la profetojn, nek la postajn verkojn.

Kaj ili ne kredas je la releviĝo, ili fartas tiom bone sur tiu ĉi tero ke ili ne bezonas pensi al posta vivo. “Kaj ili demandis lin, dirante: “Majstro””, jes tio estas la tipa kuria falseco, ĉar ili volas senestimigi Jesuon, volas lin misfamigi, precipe volas lin ridindigi, sed ili alproksimiĝas al li per tiu ĝentila titolo, Majstro. Laŭfakte ili ne intencas lerni, sed juĝi kaj kondamni.

“Moseo lasis al ni ĉi tiun skribitan ordonon”, ili referencas al Moseo. “*Se iu mortas, kaj lasas edzinon sen infanoj, lia frato edziĝu al la vidvino, kaj tiel li havu de ŝi filojn anstataŭ la mortinta frato.* Tiu estis la leĝo de levirato entenata en la libro de Readmono kaj en aliaj tesktoj de la Biblio, kiu estis fiksita por ke, skribas la Skribo, “*lia nomo ne estu estingita de Izraelo”.*

La maniero eternigi sin mem estis ke la filo havu lian nomon, tiel ke je morto tempo ĉiam estu unu kun lia nomo, kaj tiel plu por la ĉiamo. Do, se iu persono estis seninfana, la edzino estis gravedigita de la bofrato. Kaj la filo, naskota, havus la nomon de la mortinto. Tiu estis la leĝo nomata ‘de levirato’.

“Estis do iam sep fratoj. La unua edziĝis kaj mortis sen infanoj”. Ili referencas al la historio entenata en la Skribo, la populara konata historio de Sara kaj Tobio. Al kompatinda Sara mortis sep edzoj la saman nokton de la geedziĝo. *“Tiam edziĝis je la vidvino la dua kaj poste la tria, ne lasante infanojn; kaj same ĉiuj sep: ĉiuj mortis sen filoj”.*

Ili klopodas ridindigi la fakton de la releviĝo kaj do igi Jesuon ridinda kaj perdigi al li tiun etuziasman apogon de la homamasoj, por povi poste lin kapti kaj mortigi. “*Laste mortis ankaŭ la virino. Kies edzino estos tiu virino post la reviviĝo? Ĉar ĉiuj sep fratoj havis ŝin kiel edzinon*”. La demando kiun ili proponas, ne celas, kiel ni nuntempe pensas per nia okcidenta mentaleco, la amrilaton inter geedzoj, sed ke la virino utilis nure por naski infanojn.

Pro tio ili volas scii kiu el tiuj mortintaj edzoj povos havi la virinon por naskigi la filon, do por eternigi sian nomon. La dialogo do ne rilatas la amrilatojn inter geedzoj, sed la eblecon eternigi sin mem pere de la naskigo de filo, “*ĉar la sep havis ŝin kiel edzinon*”. Do la problemo ne estas la edzino, sed la filoj.

Kaj Jesuo respondas ridindigante, siavice, tiujn sadukeojn *“Nur en ĉi tiu vivo homoj edziĝas kaj edziniĝas. Sed tiuj, kiuj reviviĝos el la mortintoj kaj estos juĝataj* laŭvorte *“de tiu mondo”*, la mondo kie la morto ne interrompas la vivon, *indaj je la estonta vivo kaj je la reviviĝo el la mortintoj, nek edziĝos, nek edziniĝo*s; kaj jen la klarigo de Jesuo, *“ĉar ili ne plu povas morti*”.

Jen estas ĉi tie la emfazo de la peco, sur la fakto ke la morto ne interrompas la vivon, sed permesas al ĝi manifestiĝi en nova formo, plena kaj definitiva, kompleta. “Ili ne plu povas morti, ĉar ili estas egalaj al la anĝeloj”. Jesuo tre ironie parolas pri la anĝeloj, ĉar la sadukeoj ne kredis je la ekzisto de la anĝeloj, do Jesuo entiras ĝuste la anĝelojn ĉar la anĝeloj de kiu ricevas la vivon? Ĉu de la gepatroj?

Ne, la anĝeloj ricevas la vivon rekte de Dio. Do Jesuo komprenigas ke ne plu estas bezono eternigi propran ekziston pere de la naskigo de filo, ĉar la vivon oni ricevas, kiel la anĝeloj, rekte de Dio. Kaj, ricevante tiun vivon de Dio, tiu vivo estas eterna kaj nedetruebla. *"Kaj estas filoj de Dio, ĉar ili estas filoj de la releviĝo*", tio estas, generitaj de Dio. Estas Dio kiu komunikas al ili sian vivon mem. Kaj la vivo kiu venas de Dio estas porĉiama vivo.

"Certe estas, ke la mortintoj reviviĝas: tion asertis ankaŭ la leĝo de Moseo", ili citis Moseon kaj ankaŭ Jesuo citas Moseon *"kiam ĝi parolas pri la arbetaĵo brulanta. Tie Moseo deklaras, ke la Sinjoro estas la Dio de Abraham, la Dio de Isaak kaj la Dio de Jakob"*. La parolmaniero de Jesuo estas tipa de la rabena ekzegezo, de la bibliaj klarigoj kiujn ili faradis. Jesuo citas konatan pecon el la libro de Eliro, ĉapitro 3, kie Dio sin prezentas dirante "*Mi estas la Sinjoro la Dio de Abraham".*

"Dio de…" oni ne tiom celas la diecon kredatan de… sed la protektanton de.. Do se Dio protektas Abrahamon, protektas Isaakon, protektas Jakobon, ilin protektas dumvive, tiu protektado de Dio estas porĉiame kaj ilin protektas ankaŭ de la morto. Kaj jen la fina aserto, tre grava: *"Pro tio Li estas Dio de vivantoj, ne de mortintoj".*

La Dio de Jesuo ne estas iu Dio kiu relevas la mortintojn, sed estas la Dio de la vivantoj, la Dio kiu al la vivantoj komunikas sian vivon mem, vivon kapablan superi la morton. Do Li ne estas Dio kiu relevas la mortintojn, sed Dio kiu permesas al vivantoj vivi porĉiame. Jen tio kion oni nomas "eterna vivo kaj releviĝo".

"Ĉar ĉiuj ricevas vivon de Li", la vivo venas dank' al la Sinjoro. Oni ne devas atendi estontan releviĝon, sed jam estas vivo de tioma altkvalito ke ĝi estas nedetruebla. Jen kio estas nomata "releviĝo".